# Ĉirkaŭ *Pola Radio*

## 3. SPECIMENAJ ELTIRAĴOJ EL POLA RADIO

### 3.1. RUMANA FABELO – LA PEGO

(Ekzerco por aŭskulta kompreno)

**<u>Taskoj:</u>**

*1) Bonvolu aŭskulti la sonmaterialon, elŝuteblan je la sekvaj adresoj :*

a) en formato MP3:
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr10.mp3

aŭ

b) en formato RealAudio :
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr10.rm



*kaj respondu al la subaj demandoj.*

1. Kia birdo estas pego? Kiel ĝi sin nutras?
2. Kia virino estis la pego en sia antaŭa, homa formo?
3. Klarigu «ŝovi sian nazon en fremdan vazon».
4. «la Eternulo descendis al la tero» : kiun alian verbon eblus uzi anstataŭ *descendi*? (*Memoru ankaŭ pri la babeltura rakonto.*)
5. Kio sokas vin en la listo de malutilaj <u>insektoj</u>?
6. Kion petis de ŝi la Eternulo? Kion ŝi promesis?
7. Kio estas tiu «frukto-arbejo plena je florbedoj parfumitaj»?
8. Ĉu ŝi tenis sian vorton? Kial? Kio okazis?
9. Kien iris kaŝi sin multaj el la malutilaj insektoj?
10. Kio estis la puno de la malbona virino?
11. Kiam ŝi povos repreni sian homan formon?

**Daŭrigota.** Serĉu la sekvan parton!
Ni esperas, ke vi nun **ne bezonas** la solvojn! Se tamen, petu ilin ĉe redaktanto@edukado.net.